## Redakta noto



# Ni pli multe verku por *Scienca Revuo*

Validas por la tuta homa agado tio, kion elstara germana verkisto de la pasinta jarcento, *Erich Kästner*, skribis en sia epigramo *Moralo*: "Ekzistas nenio bona – krom se oni faras ĝin". Ni ĉiuj konscias pri la graveco de la sciencaj spirito, metodo, prestiĝo por disvastigi Esperanton kaj por daŭrigi la altnivelan, heroan jam jarcentan batalon de *Scienca Revuo*.

Nia periodaĵo grave rolas por enkonduki Esperanton en la sciencon kaj la sciencon en Esperanton. La laboron de sciencistoj neglektas nek la kulturaj rondoj, nek la registaroj, nek la diversaj tavoloj de la loĝantaro, ĉar la sciencistoj havas la plej altan rolon en la antaŭenigo de novaj ideoj; ili ne povas esti rigardataj "stranguloj", kaj oni ne kuraĝus kontraŭi ilin ktp.

Ilia rolo similas hodiaŭ al tiu de la progresemaj mezepokaj sciencistoj, kiuj, sen batali kontraŭ la latina, vigle agadis por plurflanke evoluigi la kulturon en propraj lingvoj, por poluri ties esprimojn, pliriĉigi ties leksikon, por doni al larĝa popolamaso la eblon ekscii kaj praktiki novajn ideojn en lingvoj al ĝi facile alireblaj. En siaj prelegoj antaŭ la gestudentoj, ĉiuj sciencistoj laŭdas la kuraĝon kaj sindonemon de la tiutempaj progresemaj sciencistoj, kiuj, ne sendanĝere, faris sian devon.

Ĉu ni ĉiam demandas nin pri nia propra loko en la batalo por novaj ideoj de nia tempo?



Certe, ne nur la nunaj esperantistoj kapablas kompreni la neceson kaj la gravecon de Esperanto, kaj la potencialaj legantoj de niaj periodaĵoj, inkluzive de *Scienca Revuo* estas multe pli nombraj, sed diversaj obstakloj kaj "bruoj" (antaŭjuĝoj, malinteresoj k.s.) bremsas la vojon de Esperanto.

Profesia respondeco kaj la etiko de la scienco devigas nin firme, aktive, engaĝiĝi en tiu ĉi nuntempa batalo. *Scienca Revuo* ofertas al ni daŭran eblon plivastigi ĉiujn sciencajn branĉojn de la esperantlingva kulturo.

Ni ne forgesu kaj ne neglektu tiun eblon. Spertaj sciencistoj, samkiel junaj esploristoj povas komuniki per *Scienca Revuo* la rezultojn de siaj esploroj (kiujn ili kutime prezentas en sciencaj aranĝoj), povas esprimi opiniojn pri la nuntempaj problemoj de la scienco, de la socio ĝenerale, informi pri novaj atingaĵoj de siaj naciaj kulturoj k.s. Esperanto kaj *Scienca Revuo* meritas nian entuziasman kunlaboron, kaj la aŭtoroj certe trovos pliajn formojn de kunlaboro.

Nia revuo estas tia, kia ni mem faras ĝin. La kunlaboro al niaj periodaĵoj enhavas la apartan ĝojon ne nur aperigi proprajn ideojn, sed ankaŭ progresigi validan novan idealon. Sen la homa agado, ideoj, idealoj restas virtualaj valoroj, kiuj, pli aŭ malpli longe, atendas siajn pasiajn realigantojn. Sciate, la idealoj estas senmortaj, ili restas ĉiam junaj, ili samtempe postulas kaj nutras junajn spiritojn.

Mi varme invitas nian kolegaron atente pripensi la aferon, la **bonan aferon**, por kiu ni jam estas engaĝitaj. Temas pri plurflanka bono, sed tia bono … ekzistas nur, se ni faras ĝin!

*Prof. d-ro Ignat Florian.* BOCIORT
*Wustrower Strasse 1*
*DE – 13051 – B e r l i n*
GERMANIO